

12



katolika **7** ***senito***

anno 53°
u.e.c.i.

4





KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 53° - 1974

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

**Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:**
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

**Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:**
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

**Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964**

KATOLIKA SENTO

n° 12

53a Jaro

Decembro 1974



FELIĈAN Kristnaskon kaj Sanktan Jaron 1975
ni deziras al ĉiuj niaj aliĝintoj

KRISTNASKA MARIA-KANTO

Malnova franca popolkanto

Ni kantu al Patrin', al kiu
Ni tute niajn korojn donis;
Ŝi, frukton de la viv' portinte,
La savon al homar' proponis.

Kun ŝi Jozef' al Bet-Leĥemo
Venis, kaj al drinkejo, laste,
Sed mastro pro l' edzin' rifuzis
Tra nokt' akcepti ilin gaste.

Kaj ili por dormej' pluiris,
Minacis ja danĝer-proksimo,
Ĉar infaneton naski devis
Tre baldaŭ sankta Virgulino.

Ke ŝi la korsuferon kaŝas,
Jozef' rimarkis pri Maria.
- Ho kara kunulin' - li diris,
- Kien ekiru piedo nia?

Tre lacaj, ĉe l' riĉul', modeste
Ekfrapis ili al la pordo,
Sed la riĉul' demandis: - Kie
la ĉevalparo, la eskorto?

- La bovo kun azen' ,jen tie,
 Rigardu, ĉe la pord' sin trovas.
 - Du malriĉuloj, ĉu? Ĉi domo
 Tra nokt' akcepti vin ne povas.

Kaj ili plu vojiri devis,
 Eĉ mon' ne helpis proponita.
 - Ne, vi ne povas kun aliaj
 Kunesti, - sonis vortoj spitaj.

Iu ridmokis eĉ Jozefon:
 - Ho, kien kun vi la edzino?
 Ŝi ŝajnas dekkvinjara esti
 Kaj ne pli aĝa junulino.

- Jen, tie stal', Jozefo montris,
 - Ĝi estos, do, loĝej' konvena.
 Ĉar de la Viĝulin' naskiĝi
 Infano devis amoplena.

La noktomez' apenaŭ venis,
 Infan' ridetas ĉe l' Patrino,
 Nur ŝi per minca vest' lin vane
 Varmigi provis en la sino.

Tial ŝi lin en la kripeton
 Sur freŝan fojnon lerte metis,
 Kaj, kun kapet' sur ŝtonkuseno,
 Sinjoro baldaŭ ekdormetis.

La helpopeto ĉe Maria
 al fil' ne nocos, tiel ke ni,
 Kiam la tera viv' forpasos,
 En paradizon povu veni.

Tradukis: J. Rijeĉanin

LA KULTO de la Sankta Virgulino dum Advento. (El la Papa Instrukcio "Marialis Cultus").

Dum la adventa tempo, la liturgio, krom okaze de la soleno la Senmakula Koncipiĝo de Maria, kies celebrado kuniĝas al la pretigo por la alveno de la Savanto, per la mencio de la "radiko" de Jese kaj de la feliĉa a pero de la Eklezio senmakula kaj senfalta, ofte memorigas la beatan Virgulinon, precipe ~~en la periodo~~ 17-24 de decembro kaj ĉefe en la dimanĉo, kiu antaŭas Krist naskon, en kiu oni reaŭdas la antikvajn profetajn voĉojn pri la virga Patrino kaj pri la Mesio kaj oni legas evangeliajn paĝojn rilatantajn al la proksima naskiĝo de Kristo kaj de lia antaŭanoncanto.

Tiel la fideluloj, kiuj per la liturgio travivas la adventan spiriton, per la ekzemplo de la neesprimebla amo, per kiu la Virgulino atendis sian Filon; estas invitataj rigardi ŝin kiel modelon kaj sin pretigi por iri renkonte al la alvenanta Savanto, "preĝe vekigante, ĝoje ŝin laŭdante".

Ni volas ankaŭ rimarki, ke la adventa liturgio, kunligante la atendon de la Mesio kaj la gloran revenon de Kristo kun la memorigo de la mirinda Dipatrino, montaras ian feliĉan kultan ekvilibron, kiu povas fariĝi normo por ke ni malpermesu ĉiun disiĝemon - kiel kelkfoje okazis ĉe kelkaj popularaj religiesprimoj - inter la kulto de la Virgulino disde ŝia necesa rilato al Kristo; kaj por ke ni agnosku ke ĉi tiu periodo - kiel montras la liturgiistoj - estas tempo tre taŭga por kulto al la Dipatrino: kaj ĉi tiun celon ni konfirmas, dezirante, ke ĉie kaj ĉiam ĝi estu akceptata kaj sekvata.

(Pri ĉi tiu Apostola Letero v.KS. n° 4, p.87-92)

Aliĝis al la IKUE-kongreso 1975 en Romo:

1	Pediŝic Dina	Jugoslavio
2	Jacobitti Giacinto	Italujo
3	Di Tocco Vera	Italujo
4	Massalska Helena	Pollando
5	Tic Paŭlo	Pollando
6	Dell'Aringa Norma	Italujo
7	Kiŝ Lovro	Jugoslavio
8	Páll Ferenc	Rumanio
9	Christiaens Joseph	Belgujo
10	Duilio Magnani	Italujo
11	Patafta Rikardo	Jugoslavio
12	Beckers Alphons	Belgujo
13	Ruaro Felice	Italujo
14	Galbusera Franco	Italujo

Multaj aliaj promesis sian partoprenon, sed ankoraŭ, pro diversaj kialoj, ili ne aliĝis.

Baldaŭ estos pretaj la aliĝiloj, presitaj en Verono. Ni sendos ilin per la venonta bulteno. Sed estas konsilinde ne atendi ilian ricevon por aliĝi.

LA MOZAIKO pri Nia Sinjorino de la Espero, Patro - nino de la Esperantistoj, (el pentraĵo de P. Arcangelo Intreccialagli) jam ornamas la internacian bazilikon de la Anunciacio en Nazareto. La tuta elspezo de la verko kunmetita en Milano, de ĝia vojaĝo al Nazareto kaj lokiĝo en la baziliko, atingis 600.000 lirojn, entute pagitaj de sepdeko da italaj kaj eksterlandaj katolikaj esperantistoj, kiuj nun prave ĝojas pro la bela sukceso de la pia iniciato.

DAL MONDO ESPERANTISTA

MILANO. Corsi di Esperanto presso la Federazione Oratori Milanesi. Come negli scorsi anni, il F.O.M. (Federazioni Oratorii Milanesi); ha organizzato due corsi di Esperanto che si tengono ogni martedì: il 1° grado dalle 19,30 alle 20,30 e il 2° grado dalle 20,30 alle 21,30.

MOZAMBICO. A Lorenzo Marques è stato iniziato un nuovo corso di Esperanto: 26 gli allievi.

OLANDA. La casa editrice Kluwer annuncia che oltre la metà delle copie dell'Internacia komerca kaj ekonomika vortaro" è già stata venduta nei primi tre mesi dell'edizione.

NORD VIETNAM. Entro l'anno uscirà il primo volume (di oltre 600 pagine) dell'Antologia della letteratura vietnamita tradotta in Esperanto. Esso è dedicato al pe-

riodo fra il 10° ed il 19° secolo.

U.R.S.S. L'editrice Volgus di Tallin (Estonia) ha pubblicato un nuovo libro per l'insegnamento dell'Esperanto che riscuote molto successo per la sua completezza, concisione e moderna impostazione didattica. La prima edizione del "Esperanto Keele opik" è di 35000 copie.

JUGOSLAVIA. E' stato edito un opuscolo dal titolo "Ti to pri Esperanto" con citazioni e giudizi del presidente jugoslavo sulla lingua internazionale.

POLONIA. Le agenzie di viaggio "Juventur" e "Gromada" dispongono di impiegati che utilizzano correntemente l'Esperanto. Inoltre pubblicano numerosi opuscoli in lingua internazionale ed organizzano programmi per esperantisti.

BELGIO. In occasione della Esperanto-tago, il 7 settembre, presso il salone della Regia Biblioteca è stato presentato un festival del film esperantista.

ITALIA. La IFEA (Associazione dei Ferrovieri Esperantisti) con sede in via Donato Creti, 61, Bologna, organizza una internazionale settimana sciistica degli esperantisti a Plan Val Gardena dal 15 al 22 febbraio 1975.

SPAGNA. Il giovane esperantista spagnolo Gustavo Marqueta, nella cui famiglia la lingua internazionale è sempre stata la lingua più usata, essendo i genitori di origine risp. spagnolo e russa, ha stabilito il nuovo record di salto in alto con m. 2,11.

COPENAGHEN. La famosa capitale danese è stata scelta come sede per il prossimo 60° Congresso Universale che si svolgerà dal 26 Luglio al 2 Agosto 1975.

CONFERENZA INTERNAZIONALE GIOVENTU' ESPE-
RANTISTA - con ogni probabilità terrà l'incontro nel-
la cittadina di Herning (Jutland) dal 3 al 10 Agosto 1975

VENEZIA. Dal 20 al 22 settembre si è svolto il 6° "Tri-
landa Renkontiĝo" al quale hanno partecipato esperan-
tisti giunti dalla Jugoslavia, dall'Austria e da molte lo-
calità italiane.

SONDRIO. Il 20 ottobre, a cura degli attivissimi ami-
ci di Sondrio, si è svolto l'ormai tradizionale incont-
ro esperantista autunnale con la partecipazione di nu-
merosi samideani di Milano, Como e Bergamo.

Come sempre il programma è stato a carattere gastro-
nomico e turistico, con visita alla bella chiesetta quat-
trocentesca di Sassella ed alla bottega artistica della
pietra ollare, un pranzo conviviale a base di specia-
lità valtellinesi e la "caccia" ai prodotti tipici locali.
L'inaugurazione della nuova sede del Gruppo Esperan-
tista Sondriese, rallegrata da un rinfresco, ha chiu-
so la manifestazione.

VENTIMIGLIA. 24° Convegno Interregionale.

Domenica 10 novembre, il 1° Comitato IRKE ha orga-
nizzato, nella bella cittadina ligure, un convegno con
un ricco programma di lavoro, una conferenza stampa
ed un pubblico dibattito.

LUGANO. Incontro culturale.

Dopo il grande successo riscosso in occasione del pre-
cedente incontro dello scorso anno, gli attivi esperan-
tisti ticinesi hanno riproposto un nuovo fine-settimana
culturale il 16 e 17 novembre.

La manifestazione si è svolta presso la Scuola Circo-
lo Migros sul tema "Natursciencoj:kionili signifas por
nia hodiaŭa vivo?"

BRASILE. L'apposita Commissione statale per incrementare e diffondere l'esportazione nel mondo dei prodotti della frutticoltura nazionale, utilizza anche l'esperanto per reclamizzare detti prodotti.

ISLANDA. Il maggior quotidiano islandese, Morgunbladid, ha pubblicato una lunga intervista fatta al neo-presidente della UEA, dottor H. Tonkin.

VARSAVIA. Radio Varsavia ora trasmette programmi in esperanto tre volte al giorno! Precisamente alle ore 6 (lunghezza d'onda metri 41-49 e 200), alle ore 16,30 (metri 31-41) e alle ore 22,30 (metri 49 e metri 200) L'ora è quella corrispondente al fuso orario dell'Europa Centrale.

COMMEMORAZIONE DI ZAMENHOF. Nel mese di dicembre in tutti i Circoli esperantisti, verrà commemorato il Dott. Zamenhof.

ROMA ESPERANTA VOĈO

n ° 134

INFORMOJ EL LA IKUE-1975 LKK. Dum ni atendas la aliĝilon por nia kongreso kaj la unuan programon, ni povas anticipi kelkajn novaĵojn, kvankam, pro la ofta ne bona servo de la poŝto, niaj aranĝoj fariĝas pli malrapidaj ol oni antaŭvidis. Nia estraro estas fakte dispartigita tra pluraj urboj.

La IKUE-kongreso, do, kiu malfermiĝos je la 11a de aŭgusto, havos sian indan sidejon en la granda, moderna instituto "Domus Pacis", kiu povas akcepti preskaŭ mil personojn. Ni luis ĉambrojn plejparte dulitajn,

kaj dudek unulitajn, por ducent personoj. Tiel por la unuaj 200 ni povas garantii en tiu domo la plej komfortan gastadon. La eventualaj aliaj devos esti aranĝitaj diversmaniere. Sed la romaj samideanoj estas pretaj helpi malavare por trovi al ĉiu bonan aranĝon. Adreso de la Instituto estas: Via Torre Rossa, 4, 00165 Roma. Oni atingas ĝin de la stacidomo "Piazza della Repubblica" per aŭtobuso 64, ĝis Largo Tassoni (apud la Tiber-rivero); kaj tra via dei Cimatori (maldekstre), ĉe Largo dei Fiorentini, per aŭtobuso 98, kiu haltas vidalvide de Domus Pacis. Pri ĝenerala asembleo, studkunvenoj, ekskursoj, kaj unuvorte, pri la tagordo de la tri unuaj tagoj, decidus la programo, baldaŭ aperonta. La 15a de aŭgusto, soleno de la Ĉielenpreno de Maria, estos ĉefe dediĉita al la akiro de la Jubilea Indulgenco. Matene okazos pilgrimadoj al la ĉefaj bazilikoj, kaj vespere, je la sepa h. kaj duono, en Sankta Maria Maggiore, oni partoprenos en la meso de la Papo, dum kiu la Papo alparolos la pilgrimantojn. Jam de la unua tago ĉiu ricevos "Il libro del Pellegrino", verkita en ses lingvoj. Ni intencas eltiri el ĝi resumojn en Esperanto por la kongresanoj. La kongreso finiĝos matene de la 16a. Dum la Kongreso la partoprenantoj povos ricevi ne nur la specialan insignon pretigitan zorge de nia prezidanto Don Ferdinando Longoni, sed plurajn artajn bildkartojn, kun esperanta teksto, inter kiuj kelkaj majstre desegnitaj de nia roma s-ano Inĝ. Nando Messina. Kaj pluraj aliaj agrablaj surprizoj, kiel nova esperanta preĝareto, ktp., ĝojigos nian samideanaron. Aliĝu, do, al nia kongreso, kaj rapide, por ne riski ĉiujn malfacilaĵojn de tromalfrue alvenintoj!

ALIĜO AL LA KONGRESO: 10.000 it. liroj (=svisajfr. 42,725; gld. 40.-; dol. 15,15) ĝis la fino de ĉi tiu 1974a jaro; post tiu dato la kosto altiĝos al 13.000 liroj ĝis la fino de marto, kaj al 16.000 pli poste. Oni

kalkulas je 50.000 liroj la tutan koston de duonpensio-
no (t.e. tranoktado kaj du manĝoj) por la kongresperio-
do. Por ĉiu informpeto oni sin turnu al: P. Giacinto Ja-
cobitti - Piazza S. Maria Maggiore, 8 - 00185 Roma-
Italujo.

PRI LA SANKTA JARO nia bulteno jam parolis: (v. K S.
n. 2, kaj 7-8). Ni interalie memorigis, ke la unua ju-
bileo estis proklamita de Papo Bonifaco 8a en la 1300
jaro. La dua estis dekretita por la jaro 1350 de Papo
Klemento 6a, per Buleo "Unigenitus" (27a de januaro
1343), kiu aldonis la bazilikon de S. Johano en Latera-
no al la du de S. Petro kaj S. Paŭlo, jam indikitaj de
Bonifaco 8a por la devigaj vizitoj. En 1389 Urbano 6a
reduktis la tempon inter unu Sankta Jaro kaj la alia, de
50 al 33 jaroj, memore de la vivojaroj de Jesuo; sed ĉar
li dumtempe mortis, la Jubileo estis celebrita la sek-
vantan jaron (1390) de lia posteulo Bonifaco 9a. Pli
poste Nikolao 5a decidis reveni al la dekreto de Kle-
mento 6a kaj inaŭguris la Sanktan Jaron en la antaŭta-
go de Kristnasko 1449. Paŭlo 2a per la papa Buleo "In-
effabilis Providentia" de la 17a de aprilo 1470 fiksis
la 25jaran viciĝon. La Sankta Jaro de 1975, lania, es-
tas la 25a de la historio kaj akiras apartan gravecon,
ĉar ĝi sekvas en la tempo kaj en la spirito la Duan Va-
tikanan Koncilion.

Estis la Papo mem, kiu kunligis ĝin al ĉi tiu funda-
menta vivtempo de la Eklezio; same kiel la ĵusa Konci-
lio estis eksterordinara ŝanco de renoviĝo kaj de ren-
kontiĝo, tiel ĉi tiu Jubileo devas esti karakterizita per
klopodo de renoviĝo, de repaciĝo kaj de unueco. La San-
kta Jaro 1975 celas unue "la internan renovigon de l'ho-
mo" - kiel diris la Papo; de l'homo pensanta, kiu pen-
sante perdis la certecon pri la Vero; de l'homo labo-
ranta, kiu laborante agnoskis, ke li estas tiom ekster-

memiĝinta, ke li ne plu perceptas sian personan interparoladon; de l' homo, kiu tiom serĉas plezuron, amuziĝas kaj tiom avidas ekscitilojn de ĝuaj spertoj, ke li baldaŭ tede elreviĝas pri ili".

INDULGENCOJ KAJ EKUMENISMO


La esenco de la Sankta Jaro konsistas en la pilgrimado plenumata kun penta spirito kaj kun celo akiri la indulgencojn. La indulgencoj ofte estis, en la historio de la Eklezio, motivo de kritikoj, ĉefe komence de la 16a jarcento, kiam Lutero kaptis tiun okazon por "protesta" movado, kiun li mem tamen opiniis limigita interne de la Eklezio, kaj ne ekster nek kontraŭ ĝi.

De tiam multaj aferoj ŝanĝiĝis. La Kontraŭreformo mem klarigis la miskomprenojn devenintajn de misa interpretado de la indulgencoj, instruante, ke neniu monofero validas por la savo de l' animo sen severa kaj vera klopodo de kristana vivo. Se iuflanke la indulgencoj estas ĝis nun motivo de malkonsento kun protestantoj, aliflanke la katolika Eklezio, dank' al la Ekumena Movado kaj ĉefe per la Apostola Konstitucio de Paŭlo 6a "Indulgentiarum doktrina", efektivigis notindan progreson pri sia doktrino tiurilate, revenigante la indulgencon al sia origina senco, kiu estas pentofaro kaj preĝado, reliefigante, kiel faris protestanta frato en la Ekumena Konsilantaro de Ĝenevo, la koncepton, ke Jesuo Kristo estas la vera kaj unika plena indulgenco.

El ĉiuj mondpartoj amasoj da kredantoj alcentriĝas al la sankta urbo Romo. Ĉi tiu fakto estas unu el la plej konkretaj, kvankam maloftaj manifestadoj de tiu unueco, valoraricëco de la katolika Eklezio, kiu efektiviĝas kaj identiĝas en la persono de la posteulo de Petro, laŭ la volo de Dio, episkopo de la Urbo kaj Pontifiko de la universala Eklezio. Kial Romo estis de Dio elektita por esti sidejo de la Plejalta Pontifiko estas io, kio apartenas al liaj misteroj, kiuj superas la homan konon.

LA JUBILEOJ

1	1300	Bonifaco	8a	Studoj kaj esploroj ne solvis definitive kelkajn dubojn pri la kontesteblo kaj malfacila periodo de kontraŭpapo; sed la atento kiu estis transdonata laŭ la jarcentoj la sinsekvo de la Papoj, montras la esceptan gravecon de la Apostola Seĝo. La ritoj pri la elekto de la Roma Episkopo ŝanĝiĝis dum la jaroj, restante tamen seninterrompa la ideala fadeno, kiu kunligas ĉiujn posteulojn de Petro. Eĉ dum la periodo de ilia restadejo en Avinjono, ili restis Romaj Episkopoj. Ĉi tiuj estas la ordinaraj jubileoj. Tiu celebrito en 1933 estis eksterordinara.
2	1350	Klemento	6a	
3	1390	Urbano	6a	
		Bonifaco	9a	
4	1400	Bonifaco	9a	
5	1425	Marteno	5a	
6	1450	Nikolao	5a	
7	1475	Siksto	4a	
8	1500	Aleksandro	6a	
9	1525	Klemento	7a	
10	1500	Julio	3a	
11	1575	Gregorio	8a	
12	1600	Klemento	8a	
13	1625	Urbano	8a	
14	1650	Inocento	10a	
15	1675	Klemento	10a	
16	1700	Inocento	12a	
		Klemento	11a	
17	1725	Benedikto	13a	
18	1750	Benedikto	14a	
19	1775	Klemento	14a	
		Pio	6a	
20	1825	Leono	12a	
21	1875	Pio	9a	
22	1900	Leono	13a	
23	1925	Pio	11a	
24	1950	Pio	12a	
25	1975	Paŭlo	6a	





ESPERANTA SIMPOZIO EN NIEPOKALANOW

Pli ol sepdek da partoprenantoj en la Simpozio de Esperanto, organizita honore al Beata P.M. Kolbe en Niepokalanów, Polujo, garantiis la sukceson de la aranĝo kiu turnis la atenton de la pola socio al nia movado. La loko, nome la Mari-Hejmo de la Martiro el Oswiecim, kiu aprezis nian mondlingvon, montriĝis vere gastama kaj permesis al la kunvenintoj preĝi kune kaj debati. Ili venis el pluraj landoj: Hispanujo, Francujo, Norvegujo, Italujo, Nederlando, Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakio. Alvenis saluttelegramoj kaj bondeziroj el Aŭstralio, Japanujo, Nov-Zelando, Brazilo, Afriko (Madagaskaro), Kanado. Oni aplaŭdis tutspecialon de la esperanto-episkopo Mgr. A. Pichler, Jugoslavio, kaj tiun de la Universala Esperanto-Asocio, subskribitan de la Vicprezidanto C. Stop-Bowitz. La spiro

rita atmosfero de la medio estis frata, sincera kaj serena.

La unua tago komencita per la s-ta Meso kuncelebrita, estis nomata "franciskana", des pli, ke P. Kolbe estis filo de la Sanktulo el Asizo. P. H. Paruzel enkondukis ĉiujn en la gvidan penson de P. Kolbe kaj P. E. Peltier, kiuj ambaŭ laboris por la samaj celoj kaj fidis al la Patrino de ĉiuj Kristanoj. (Vidu K. S. n° 10/74.)

Sekvis tuj poste prelego pri la fama itala franciskano P. Carolfi de F-ino Truus Durenkamp, eksredaktoro de E. K.

Posttagmeze oni denove revenis al la Sankta Patrono de la Simpozio. Nome estis prezentita ĉapitro el la libro de Kard. St. Wyszynski ĵus esperantigita. La verko titolita: Iras nova homa gento (idzie nowych ludzi plemie) dediĉas paĝojn al Patro Kolbe kaj lia apostolado.

La tutan aŭdantaron interesigis la EK-Redaktoro, kiu pravas la superecon de nia mondlingvo je la latina. Kiel longjara profesoro pri la latino, li sukcesis trovi manieron por ke la "seka" temo estu ekscitanta la scivolecon, veku kaj tenu ĉies atenton ĝis lia lasta konkludo, omaĝanta la Kreinton de nia mondlingvo.

Vespere la Simpozianojn edifis Panoramo de l' Miljaro, ilustranta per moviĝantaj bildoj la gravajn heroojn de la pola historio ekde 966 ĝis niaj tagoj.

La sekvan matenon en la sama kriptotemplo havis lokon scenoj el la Pasiono de Nia Sinjoro.

Dro Ceslao Biedulski en sia referaĵo pri Ekumenismo kaj Homaranismo reliefigis la iniciatintojn de ekumenismo en esperantujo, kiu havas sian specialan esprimon en la Zamenhofa homaranismo entenata cetere en la bibliaj fontoj el kiuj Kristo, la Filo de l' Homo, superabunde ĉerpis.

Vizito al Muzeo de P. Kolbe, kies apostola vivo en Po

lujo kaj eksterlande, sed speciale lia morto kaj gloro nerezisteble allogas, preparis ĉiun spirite al la Pontifika Meso en esperanto kuncelebrata de tridek sacerdotoj kun lia Ekscelenco Episkopo Dro L. Miziolek el Varsovio. Ni devas juste konfesi, ke la Prelato tre korekte legis la esperantan mestekston. Lian predikon prezentis P. H. Paruzel. La Episkopo salutis la ĉesantaron en la nomo de la Pola Eklezio, en la nomo de la Pola Episkoparo kaj en sia propra. Li substrekis, ke la Eklezio en Polujo kaj la Episkoparo komprenas la direktojn de la hodiaŭa mondo, inter kiuj la unueco de la homa familio fariĝis ne nur idealo, sed senpera neceso. Pro tio la larĝa malfermiĝo je ekumenismo kaj ĉiuj fratecaj kontaktoj inter la kunhomoj.

Mgr. L. Miziolek deklaris, ke "en tiu orientiĝo al unueco de la homaro ankaŭ la esperanto-movado ludas gravan rolon, dezirante servi al interkompreno kaj frateco forigante la barojn de lingva diverseco".

Aludante pri P. Kolbe, Lia Ekscelenco L. Miziolek konstatis, ke funda kono pri la moderna mondo kaj ties streboj al unueco kondukis Patron Kolbe for de la Patrujo, kie li estimis la signifon de Esperanto dum lernado de malfacila japana lingvo.

Dum la sankta Meso ĉiuj plenumis Mes-partojn en gregoria ĉanto (La Anĝela Meso). Ĉeestis la ensemblo "Evangelia Ritmo". Je la fino ĉiuj kantis la nacian religian himnon, kies refreno preĝas, por ke Dio "benu la liberon" de la Patrujo.

Posttagmeze kunvenis polaj IKUE-anoj; dum tiu kunveno estis elektita Sac. Dro Romano Forycki gvidanto de siaj samcelanoj, kaj do sekvanto de P. Paruzel, kiu ekde multaj jaroj prezidis la IKUE-anojn en Pollando.

Interesplene, gaje, kaj en viva, facilanima, bonhumora stilo, rakontis P. A. Ciccanti, la "Fluganta Predikisto de la Nova Sento", migranta kun ĝi de loko al

loko. Li raportis iom pri sia unua poresperanta laboro en Polujo. Li vizitis Zabrze, Krakow, Tarnow, Przemysl, Wroclaw, Lodz, Warszawa, Siedlce. Liaj rimarkoj pri renkontitaj skeptikaj altranguloj kaj, "fremdlingvanoj", kies atenton li turnis de iliaj lernitaj lingvoj al nia esperanto, vekis eksplodojn de ridoj kaj aplaŭdojn.

Lunde la simpozianoj vizitis la naskiĝlokon de Frederiko Chopin, kaj la Ĉefurbon marde. La saman vesperon la menciita jam "Evangelia Ritmo" donis al ĉiuj "Horon" kun meditoj kaj kantoj.

Merkrede, post kuncelebrita Meso, S-ino Jelly Koopmans regalis la partoprenantojn per profunda, finpreĝita kaj pensita altnivela prelego. Ĝi temis pri diversaj aspektoj de ekumenismo, kiu survoje al plena realiĝo pasas tra vojkruciĝo. Sub la Krista Kruco estas la renkontejo de ĉiuj Diaj Filoj.

Poste la IKUE-Prezidanto sciigis la ĉeestantaron pri la laboroj de la Estraro kaj invitis al la IKUE-kongreso en Romo dum la jubilea jaro 1975. (11-16.VIII.75).

La Simpozio finiĝis per "Salve Reĝino" en gregoria ĉanto.

+++

En Lublin, ĵaŭde la 24.X.75 je la 16,30 havas lokon denove pontifika Meso en la preĝejo de PP. Kapucenoj.

Multaj simpozianoj de Niepokalanow alvenis por partopreni dum la belegaj horoj en tiu universitata urbo.

En la Biblioteko de la Katolika Universitato (KUL) solenas la malfermo de la Esperanto Librejo. Ĉeestas du Episkopoj, Mgr. L. Miziolek el Varsovio kaj Mgr. Pylak, la Episkopo de Lublin. Prelegas pri la "Signifo de Esperanto en la ekumena movado" - Don Ferdinando Longoni.

P. Paruzel sincere dankis la gastiganton D-ro Doc. Prof. Romuald Gustaw, la Direktoron de la Univ. Bib -

lioteko kaj la Prizorganton de la Esperanta Librejo Dr. C. Biedulski.

Modesta vespermanĝo, dum kiu regis amika, esperantista spirita atmosfero finis tiujn tagojn neforge-seblajn en Niepokalanow kaj Lublin, du centroj, kie ĉiuj esperantistoj povas senti sin hejmece, "ĉe si".

F.G.

INDONEZIO. Pliiĝas la katolikoj kaj iliaj apostolaj agadoj. De nur 90.000 indoneziaj katolikoj en 1949, hodiaŭ ili kreskis al du milionoj kaj duono. El la 13677 insuloj, kiuj konsistigas la kontinenton, tiu kiu havas la plej altan procenton da katolikoj estas Flores, kie 70 procentoj de la loĝantaro estas katolika, dum la pli grandan nombron da konvertiĝoj oni konstatas en Javo (la plej grava insulo en la insularo), en kies centrorienta regiono tutaj vilaĝoj volas eniri en la Eklezion. Oni rimarku, ke Indonezio estas unu el la malmultaj landoj en la mondo, kie oni konstatas konvertiĝojn el Islamo. Tre edifa ekzemplo estas tiu de la unua indonezia kardinalo, Jozefo Darmojuwana, ĉefepiskopo de Semarango, kiu konvertiĝis el Islamo al katolikismo, kiam li studis en jezuita kolegio.

En ĉi tiu sennombra insularo, kiun S. Francisko Saverio difinis: "la insuloj de la espero", zorgas pri misia kaj paŝtista laboro 1.435 sacerdotoj, el kiuj 390 aŭtoritatoj, helpataj de 1.105 fratoj kaj 3.668 fratinoj, el kiuj 3.029 indoneziaj. La espero de la Eklezio kuŝas kiel ajn en la seminarianoj, kies nombro triobliĝis dum la lastaj 15 jaroj.

Sendube, laŭ procenta vidpunkto, du milionoj kaj duono da katolikoj el 135 milionoj da loĝantoj ne estas multaj, sed ilia influo pere de la presajaro kaj de la lernejoj kaj karitataj institucioj estas tre rimarkinda. Ho-

diaŭ la Katolika Eklezio zorgas en Indonezio pri 350 infanĝardenoj, 1950 duagrada lernejoj, 4 universitatoj kaj 228 lernejoj por malsamaj celoj; dum en la katolika asista kampo funkcias 138 hospitaloj, inkluzive 6 leprolejoj krom 308 dispensarioj aŭ similaj organizoj.

Notinde estas ankaŭ, ke la plej bona televida entrepreno de la lando nomata "Sangapathin", estas direktata de katolikoj; ke la plej disvastigita ĵurnalo "Kompas" estas same estrata kaj redaktata de katolikoj, kiel ankaŭ la grava kultura revuo "Basis".

TRE MALFACILA ESTAS la situacio de la katolika Eklezio en Malajzio, ĉar la muzulmana partio, la plej forta en la registaro, opozicias ĉiamaniere al la misiistoj. La paŝtista letero de la Episkopa Konferenco denuncas enkarcerigojn kaj forigojn de eksterlandaj misiistoj; aliaj devas renovigi restadpermeson eĉ ĉiumonate aŭ ĉiumonatan tagon. De malmultaj jaroj oni konstatas pligravigon de malhelpoj.

Kvankam la kristanoj estas malmultnombraj (289.500, t.e. 2,5 procentoj de la tuta loĝantaro), tamen ili estas tre aktivaj. Tion montras la lernejoj, kiujn ili gvidas, hospitaloj kaj klinikoj; ili konstruis centron kaj ekzercejon por handikapatoj, pensionon por maljunuloj, asistan centron por knabinpatrinoj, kaj por sociaj helpoj. Dum ĉi tiu tempo estas konstruata kliniko por kancer-malsanuloj kaj en fakaj lernejoj misiistaj fratinoj pretigas flegistinojn. Eĉ se ĉiuj eksterlandaj misiistoj estos forigitaj, eĉ se la loka Eklezio devus labori en la kaŝiteco, la indiĝenaj misiistoj estas deciditaj ĉiukoste rezisti, ĉar forta estas la kredo kaj malavara la sindediĉo de la kristanaro.

La sendependa federacia ŝtato de Malajzio estis starigita la 16an de septembro 1963 per la unuiĝo de ŝtatoj de la orienta kaj okcidenta Malajzio. Ĝi havas 11.392.400

Malajzianoj sur teritorio de 336.000 kv.kilometroj.

LA EKLEZIO EN LA insuloj de la Pacifika oceano. La franca Polinezio estas por la katolika Eklezio tre taŭga grundo por evangelizado, kvankam ne sen malfacilaĵoj. La teritorio, konsistanta el ĉirkaŭ 130 atoloj dissemitaj tra milionoj da kvadrataj kilometroj de la Pacifika Oceano, etendiĝas entute tra 3.855 kv.km. kun loĝantaro de nur 120.000 animoj.

La katolikoj estas triono de la tuta loĝantaro, tio estas iom malpli ol 40.000 personoj, kaj ilia paŝtista zorgo estas komisiita al 39 sacerdotoj de la Kongregacio Picpus kaj al 4 aliaj. Kunlaboras 51 fratinoj, el kiuj nur 4 aŭtoktonaj kaj 105 libervolaj katekistoj. Tre valora estas la agado de ĉi tiuj, ĉar pro la grandaj distancoj nur malofte kelkaj komunumoj povas vidi la misiⁱistojn.

VJETNAMIO. Post du jaroj katolikoj kaj protestantoj de ĉi tiu lando havos la saman tekston de la Nova Testamento laŭ Vjetnama traduko. Aliaj tradukoj en la dialektoj djaraj kaj koho estos samtempe prilaborataj por la minoritatoj. Kaj oni zorgas, ke post kelkaj jaroj estu same pretigitaj tradukoj ankaŭ de la Antikva Testamento, por ke la loĝantoj de la delto kaj de la montaraj regionoj povu disponi pri la Biblio.

La entrepreno de ĉi tiu laboro estis decidita dum seminaro por la formado de Bibliaj tradukistoj, okazinta antaŭ kelkaj monatoj ĉe la protestanta centro "Alian - co" de Dalat. Partoprenis en ĝi kelkaj eksterlandaj profesoroj de la Internacia Biblia Societo, pastoroj kaj protestantaj misiistoj, 14 katolikaj sacerdotoj kaj kelkaj laikoj reprezentantoj de la lingvoj vjetnama kaj de la minoritatoj. Ĉeestis ankaŭ protestanta delegacio de Laoso.

BONFARA KASO. Antaŭ sep jaroj ĉe Kristnasko ni decidis ne nur doni malgrandan helpon al du maljunaj kaj malriĉaj s-aninoj, sed kuniĝi al la kampanjo por doni "bovinon al ĉiu malriĉa familio" en Pakistano. De ti am, pro malavareco de niaj s-anoj, ni povis transdoni al la pakistana misio 450.000 lirojn. Se tio ne ŝajnas multo, oni pripensu, ke plejofte la oferantoj estas la samaj romaj s-anoj.

Nur kelkfoje aldoniĝis eksterlandaj bonfarantoj.

Okaze de Kristnasko ni volas denove doni la kutiman oferon al niaj du s-aninoj: 20.000 lirojn por ĉiu. Kaj restas en la kaso ankoraŭ 4.600. Ĉu vi ne volas porti donaceton al la malriĉa infano Jesuo, kuŝanta en la betlehe-
ma ĝroto? Jen bona ŝanco por vi: la Bonfara Kaso de la romaj esperantistoj!

C O M U N I C A T O

CONVOCAZIONE dell'Assemblea "costituente" del Gruppo di Roma dell'U.E.C.I.

Domenica 29 dicembre 1974, alle ore 11 precise, si terrà l'Assemblea "costituente" del GRUPPO DI ROMA dell'U.E.C.I. presso il Pontificio Istituto di Studi Orientali in Piazza Santa Maria Maggiore, 12.

L'ordine del giorno è il seguente:

- 1) Costituzione del Gruppo di Roma dell'U.E.C.I.: significato, scopo, programma
- 2) Regolamento del Gruppo di Roma
- 3) Elezione del Comitato Direttivo

Per la buona riuscita dell'iniziativa è necessario che tutti gli iscritti siano presenti.

Si ricorda a coloro che ancora non si sono iscritti al

Gruppo di Roma che la quota sociale è di lire 3.000 (2.000 per U.E.C.I. nazionale che include l'abbonamento al mensile "Katolika Sento" e 1.000 per il Gruppo di Roma).

Le adesioni si accettano presso il domicilio del socio promotore: Sig. Angelo Scalia - Via Nocera Umbra, 178 - 00181 Roma - Tel. 7941069.

LA KUNMETITAJ BONDEZIRKARTOJ kostas nur 10 li rojn. Rapidu peti ilin.

INFORMO. Literatura Suplemento de "Heroldo": Guareschi en Esperanto.

Ĝus aperis la Literatura Suplemento de "Heroldo de Esperanto", la duonmonata grandformata sendependa Esperanto-gazeto, kiu aperadas jam de 1920.

La Suplemento enhavas tradukojn el la araba, hebrea, hispana, itala, nederlanda, rusa kaj ukraina literaturoj, krom originalaj prozaĵoj kaj poemoj.

Kunlaboris 11 aŭtoroj.

Aparte interesa estas fragmento el la romano de Guareschi "Don Kamilo" (filmita, kun Fernandel en la ĉefa rolo), kiu unuafoje aperas tradukita en Esperanto.

Senpaga provekzemplero de "Heroldo de Esperanto" estas ricevebla ĉe la adreso:

Rue de la Reinette 13/Pippelingstraat, B-1000 Bruselo, Belgujo.

Abono por 1975 kostas 370 b.fr. aŭ egalvaloro.

POR INFORMI DAŬRE ĈIUJN KONGRESANOJN ni sen dos al ili Katolikan Senton. Ili povos pagi ĝian abonon (2.000 lir.) ekde nun, aŭ aldoni ĉi tiun pagon al la tu ta kongresa elspezo. Krom la propagando, kiun ni fa ras per niaj bultenoj, informo pri la kongreso estos do nita ankaŭ per la Jarlibro de UEA-1975 kaj per flugfo lioj disdonitaj al korespondantoj de la Roma Esperanto Radio.

ALIĜIS AL KATOLIKA SENTO-1975a (Unua listo):
Busto Arsizio (VA): E. Violi; Ercolano (NA): P. Rolan do Incoronato; Frascati (Romo): P. Urbajtis; Ĝenovo: E. Bafico; Mantova: N. Dell'Aringa; Monte Porzio Ca tone (Romo): T. Minio-Paluello; Napolo: C. E. Campa no; T. Restaino; Novara: G. Pisoni; Romo: U. Batta glia; A. Scalia; M. Mirella, N. Pagliari; A. De Salvo; G. Jacobitti; C. Canu; L. Senes; Fr. Venezia; Caroli na Minnaja; N. Messina; E. Migliorini; M. Canevari; R. Merlini; E. M.; O. Sias; Lea e Laura Patrizi; Z. Carrubba; J. Christiaens; B. Benassi; V. Di Tocco; P. Tic; C. Arieti; E. Puracchio; Treviso: S. Boschin; Belgujo: A. Beckers; Britujo: J. B. Twilley; The Bri tish E. A.; Ĉeĥoslovakio: V. K.; A. B.; Ĉinio: El Po pola Ĉinio; Francujo: J. Dedieu; Germanujo: H. Zimme rer; Hungarujo: A. Csepella; Jugoslavio: D. Pedisic; A. Pichler; J. Velebit; Nederlando: D. De Boer; L. G. Wulfers; Pollando: 50 Pola KUE; St. Plachta; E. Kols trung; A. Mackiewicz; R. Forycki; W. Wlodarczyk; H. Massalska; Usono: S. Klimowicz.

Entute: 105

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

Quota di abbonamento L. 1500

Abonkotizo italliroj 1500

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE